

FORSTISTA INFORMILO

de INTERNACIA FORSTISTA RONDO ESPERANTLINGVA
kaj de PATRONA ASOCIO „LEXICON SILVESTRE“ R.A.

Nr. 46 Eberswalde, 2002-12-01

1. Jubileo

En la momento de la komenco de nia membrokunveno telefonis s-ino Valentina Kovalëva, Novosibirsk, Ruslando, al la loĝejo de d-ro Simon, por saluti kaj gratuli al Direkcia Konsilio pro la 20a datreveno de la unua eldono de "Forstista Informilo"(FI). S-ino Kovalëva kunlaboras ekde novembro en 1982 pri la "Lexicon" kaj deklaris je 1993-09-08 sian membriĝon en nian asocion. Tiam ŝi laboris kun mezgrada forstfaka kvalifikiĝo en la Sibiria Botanika Ĝardeno. Hodiaŭ ŝi estas rentulino kaj tenas bovinon pro pasigi sian vivon. En la numero 1 de la FI jam estis nomitaj 13 geforstistoj, kiuj deklaris sian pretecon kunlabori pri forstfaka vortaro.

2. Informo pri la membrokunveno de "Patrona Asocio „Lexicon silvestre“ r.A." je 2002-10-11

La protokolon de la membrokunveno vi trovos kiel aldonajon 1.

3. Informo pri la preleg-aranĝo "Forstfaka terminologia laboro 2002" je 2002-10-11

La aranĝo denove estis aranĝita kune kun "Patrona Asocio 'Lexicon silvestre' r.A., IFRE kaj Eberswaldea Kulturligo r.A. La sekvaj gesinjoroj sendis salutojn al la aranĝo: Prof. d-ro Anders, geedzoj Blanke, s-ro Blaško, s-ro Cram, prof. d-ro Lipoglavšek, s-ro Moudrý, geedzoj Panka. 13 ĉeestantoj.

Post dankesprimoj al la Faka Altlernejo Eberswalde pro la disponigo de lekcisalono d-ro Götz direktis la aranĝon.

3.1 Mirella Zeidler: Natursimileco kaj naturprotekt-faka taksado de arbar-starejoj en la biosfero-rezervejo Schorfheide-Chorin (Ŝorfheide-Ĥorin) (prelego kun bildaj dokumentoj) (v. aldonajon 2)

En la diskuto esprimiĝis ke en Meklenburgo-Antaŭpomerio jam troviĝis interesuloj por la nova metodo. Oni rekomendis prelegon antaŭ la Brandenburga Forstasocio. Al la demando pri la indikoj pri mortligno estis klarigite, ke oni faris la inventaradon laŭ kvantoŝtupoj.

3.2 K.-H. Simon, H. Weckwerth, K.-P. Weidner: La "Lexicon silvestre" kiel CD (prelego kun projekciado de la funkci-metodo de la CD). (V. aldonajon 3)

Dum iom longa diskuto estis klarigite, ke ĝis nun por la germana kaj Esperantlingva versioj ekzistas ĉ. 5000 nocioj en 5 partoj. Por la Franca nun la 4a parto estas preta, por la Ĉeĥa oni pretigas tiun ĉi parton. Oni konstatis, ke la CD povas esti rimedo, iom pli rapide labori per la enhavo de la "Lexicon". Speciale en la internaciaj studsekcioj oni uzu pli amplekse la "Lexicon". La biblioteko de la altlernejo ne respondis al la ekzistaj libroofertoj ekde novembro 2001.

3.3 J.A. Pachter: La kunlaboro de forstkanton-administracioj de Treptow kaj Gdansk evoluiĝas.

La ampleksa prelego kaŭzis kelkajn demandojn. D-ro Dittmar kompletigis la prezentadon per raporto pri la kunlaborado, kiun oni faris pri la produktad-povologiaj areoj en Polando. Tiujn la polaj sciencistoj tre bone flegas.

3.4 K.-H. Simon, Horst Weckwerth: Ideoj pri la estonta forstterminologiaj laboroj (D-ro Weckwerth prelegis) (V. aldonajon 4).

Dum la diskutado oni parolis pri la malfacilaĵoj ĉe la prilaborado de fremdlingvoj, speciale ankaŭ pri la difinado de la nocioj.

4. Forstfaka terminologia laboro 2003

Por la prelegaranĝo "Forstfaka terminologia laboro 2003", kiu estas planita por la 10a de oktobro 2003, anoncoj kaj deziroj pri prelegoj estas dezirataj.

5. Librooferto

Ekde la oferto en FI 45 ni eldonis la jenajn volumojn:

Prezo: EURO

„Lexicon silvestre, Prima pars,,

Lesnický slovník

Česká verze (l/cs/3) s definicemi. X, 113 p.

3. Vydání, 2002

3-931 262-71-5(Gb)

31,-

Metsanduslik sõnaraamat

Eestikeelne osa (l/et/1) koos seletustega. X, 61 p.

1. Edition, 2002

3-931 262-70-7(Gb)

21,-

<p>„Lexicon silvestre, Secunda pars,, Lesnický slovník Česká verze (II/cs/2) s definicemi. X, 119 p. 2. Vydání, 2002</p>	3-931 262-73-1(Gb)	31,-
<p>„Lexicon silvestre, Tertia pars,, Lesnický slovník Česká verze (III/cs/1) s definicemi. X, 117 p. 1. Vydání, 2002</p>	3-931 262-52-9(Gb)	31,-
<p>„Lexicon silvestre, Quarta pars,, Wörterbuch des Forstwesens Deutsche Version (IV/de/2) mit Definitionen. X, 192 p. 2. Auflage, 2002</p>	3-931 262-68-5(Gb)	39,50
<p>Dictionnaire de foresterie Version française (IV/fr/1) avec définitions. X, 167 p. 1^{re} Édition, 2002</p>	3-931 262-72-3(Gb)	38,-

Al asocianoj de „Patrona Asocio ‚Lexicon silvestre‘ r.A.“ ni povas doni rabaton ĝis 50 %.

5. Pri la uzado de "Internet"

Por kelkaj ricevantoj de "Forstista Informilo" ni jam povis uzi "Internet", ĉar aŭ ili mem proponis tion aŭ ni konas ilian e-mail-adreson. Ni intencas en la estonteco uzi pli vaste tiun komunikadan rimedon, por mallevigi la ŝarĝadon de la Patrona Asocio per la preparo de la paperaj ekzempleroj kaj la ekspedado. Tial ni petas vin informi nin pri via e-mail-adreso sed ankaŭ pri tio, ĉu vi plu preferas ricevi paperan ekzempleron.

6. Indikoj pri bank-konto

Por ĝirado de membrokotizoj kaj financaj donacoj:

Kontonumero: 39 010 88 104; banknumero: 17 052 000; Sparkasse Barnim en Eberswalde.

La Direkcia Konsilio de la "Förderverein" dankas al ĉiuj kunagantoj pro la laboro plenumita de ili kaj deziras al ili kaj iliaj familianoj sanon kaj kreadan potencon dum la nova jaro.

Aldonaĵoj:

Pro financaj kaŭzoj la prelegoj povas aperi nur resume. Interesitoj povas mendi kopion de la kompletaj prelegmanuskriptoj ĉe Patrona Asocio "Lexicon silvestre" .r.A. en Eberswalde aŭ ĉe la aŭtoroj .

- 1) Protokolo de la membrokunveno je 2002-10-11
- 2) Mirella Zeidler: Natursimileco kaj naturprotekt-faka taksado en la biosfero-rezervejo Schorfheide-Chorin
(Ŝorfhejde-Ĥorin)
- 3) K.-H. Simon, H. Weckwerth, K.-P. Weidner: La "Lexicon silvestre" kiel CD
- 4) Karl-Hermann Simon/Horst Weckwerth: Ideoj pri la estonta forst-terminologia laboro

Feliĉan Novjaron

Herausgeber: Förderverein „Lexicon silvestre“ e.V., Eberswalde. Adresse: Fachhochschule Eberswalde, Bibliothek, Friedrich-Ebert-Straße 28, DE-16225 Eberswalde.

Redakteur: Dr. Karl-Hermann Simon, Carl-von-Ossietzky-Str. 21, DE-16225 Eberswalde. Tel. +49-3334-22154
<khsimon@fh-eberswalde.de> Nicht gekennzeichnete Texte stammen vom Redakteur.

<http://www.fh-eberswalde.de/info.htm>

Aldonaĵo 1

Patrona Asocio "Lexicon silvestre" r.A.
- Direkcia Konsilio -

Protokolo

de la membrokunveno je 2002-10-11
en Eberswalde, Schicklerstr. 3, Alte Akademie

Komenco de la kunveno: 14.00 h

Ĉeestantoj: D-ro Götz, s-ino U. Müller, s-ro Panka, s-ro Peters, d-ro Simon, d-ro Weckwerth, s-ro Weidner

El la regiono sin senkulpigis: S-ino. Blanke, s-ro Blaško, s-ino Hafemann, s-ino Meier, s-ino Morgenstern,

s-ino Neudecker, s-ino Reimann, s-ro Römpler

Proponita tagordo:

1. Bonvenigo kaj komencigo
2. Konstato pri decidrajto
3. Akcepto de la tagordo
4. Akcepto de la jarraporto 2000 de la direkcia konsilio
5. Raporto de la kasrevizorino
6. Senŝarĝigo de la direkcia konsilio
7. Elekto de la direkcia konsilio
8. Elekto de la kasrevizoro
9. Decido pri la akcepto aŭ rifuzo de deklaroj pri membriĝo
10. Kromaj problemoj

Al 1: D-ro Simon malfermis la kunvenon kaj salutis la ĉeestintojn.

Al 2: Konstato, ke la kunveno estas laŭorde kunvokita kaj estas decidrajta.

Al 3: La tagordo estis voĉlegita kaj laŭ de la deziro de la kunveno decidis, ke oni kunigu la punktojn 7 kaj 8.

Al 4: La jarraporton 2000, jam skribita en "Forstista Informilo" No.43, estis aprobita sen diskuto.

Al 5: La kaskontrola raporto de la kasrevizorino estis voĉlegita kaj estis aprobita sen diskuto.

Al 6: Per la akcepto de ambaŭ raportoj la Direkcia Konsilio estis unuanime senŝarĝita.

Al 7 kaj 8: Oni elektis s-ron Ullrich kiel gvidanton de la elekto kaj d-ron Weckwerth kiel balotasistanton.

Ekzistis la sekva listo pri kandidatoj:

D-ro Götz, s-ino Reimann, d-ro Simon, s-ro Weidner, d-ro Weckwerth.

Por la kasrevizorino s-ino Henze denove kandidatis.

Okazis sekreta baloto per balotiloj.

Oni donis 7 validajn voĉojn.

Ĉiuj gekandidatoj ricevis la tutan voĉnombron kaj do validas kiel elektitaj.

Al 9: Ekzistis la deklaron pri membriĝo de prof. Arefjew, Woronesch, Ruslando. Oni ankceptis la deklaron.

Al 10: - Laŭ rekomendo de la financ-oficejo necesas ŝanĝo de la statuto de la Asocio rilate punkto 10.2. La ŝanĝita punkto estas jene:

10.2 Ĉe malfondo de la asocio aŭ ĉe nuligo de la celoj, privilegiitaj rilate imposton, la propraĵo de la asocio estas transdonota al la „Eberswalder Förderverein für Lehre und Forschung e.V.", kiu uzu ĝin sole por publikaj, karitataj aŭ ekleziaj celoj. Tiun ĉi ŝanĝon la kunveno decidis unuanime.

- Informo pri decido de Direkcia Konsilio je 2002-06-06 al la dono de licencoj:

"Principe povas esti donitaj senpagaj licencoj al asocioj pri presado de partoj de Ls en la respektiva hejmlando de asocio pri eksklusiva vendo en la respektiva lando. Ni atendas, ke post profitodona vendo, oni transdonos donacon al la asocio, por ke iom estonte oni povas repagi monpruntaĵojn senpage donatajn al la asocio. Tiu ĉi determino konformas al la intenco de la statuto de nia asocio."

Ĝis nun kvar licencoj estas donitaj.

Fino de la kunveno: 14.30a horo.

Protokolanto: D-ro Weckwerth

Aldonaĵo 2

Natursimileco kaj naturprotektada taksado de arbarstarejoj en la biosfero-rezervejo Schorfheide-Chorin (Ŝorfhejde-Ĥorin)

Mirella Zeidler

Por la realigo de celoj de la specio- kaj biotop-protektado en arbarekosistemoj de nia nuna kultur-pejzaĝo oni bezonas kelkajn indikatojn kiel natur-similecon, maloftecon, endanĝerigon kaj reprezentecon. Por la konstato de la daŭro kaj intenso de antropogenaj ŝanĝiĝoj sur arbarstarejoj oni determinas la ŝtupon de la natursimileco por krei antaŭkondiĉojn por la protektado, la konservado kaj la evoluigo de natursimilaj arbarekosistemoj inkluzive de la nature evoluantaj procedoj.

Arbaroj estas kompleksaj ekosistemoj kun procesoj, kiuj estas interligitaj unu kun aliaj kaj kiuj funkcias sur tre diversaj spaco- kaj temposkaloj. Ili evoluas dum longa tempo, kio spegulas sin en iliaj strukturoj, specio-kombinaĵoj kaj pluaj parametroj. Pli intense rigardinte la estantan situacion sub tiu ĉi vidpunkto oni konsideras la tadsadon de natursimileco laŭ la metodo de mapado de arbarbiotopoj en la lando Brandenburgio kiel malsufiĉa.

Tial metodo de taksado de natursimileco estis por arbar- kaj forstekosistemoj estis evoluigita, kiu inkludas veget-sciencajn, arbarerajn kaj stareologiajn kriteriojn. Oni provis, deiri de tuteca vidpunkto, kiu ne sole konsideras la arbospecian distribuon, sed inkluzivas la surgrundan vegetalaron, la naturan junigaĵon, la kontinuecon de la habito aŭ arbizaĵo, la kvoton de old-arbarero kaj de mort-ligno kaj aktualajn kaj historiajn faligadformojn.

La ekologian taksadon oni faras laŭ tiu ĉi metodo per reprodukteblaj arbarero-priskriboj. Unue oni taksas la unuopajn kriteriojn laŭ taksadskemo kun 4- aŭ 5-ŝtupaj skaloj depende de la eco de la kriterio. Oni elektis klarajn limojn, por eta teni la subjektivan faktoron de la prilaboranto kaj atingi bonan kompareblecon. Kiel rezulton ni akiras valorojn de la natursimileco de la kriterioj, kiujn oni akumulas al unu natursimilec-valoru (valoroj de 0 ĝis 85). Tiun ĉi natursimilec-valoron oni densigas al natursimilec-ŝtupo de 1 (naturfora) ĝis 5 (tre natursimila).

La prezentadon de la taksadoj de la arbar- kaj forstekosistemoj oni faras en la natursimilec-taksadmapo kun la indiko de la natursimilec-ŝtupo (koloro prezentita) kaj de la indiko de la natursimilec-valoru (kiel distingil-punkto). Ĉar oni ne konsideru la natursimilec-valoron sendepende de la unuopaj taksadoj, oni povas indiki la rezultojn de la taksado de la unuopaj kriterioj en formo de mapoj kaj tabeloj.

Unuflanke ebligas la diferencigita taksado bonan kompareblecon de arbar- kaj forstekosistemoj sur kelkaj ebenaĵoj kaj oni povas pli klare akcenti la diferencojn. Aliflanke oni povas uzi la rezultojn kiel decidmezurilon, ekz. por la elekto aŭ indiko de arbaraj natur-rezervejoj aŭ rezervejoj. Oni povas uzi ilin kaj ĉe la mapado de arbarbiotopoj kaj ĉe la planado de protektad-, flegad- kaj evoluigfaradoj, kiel dataojn por la pejzaĝplanado aŭ kiel argumenton ĉe la prijuĝo de intencitaj intervenoj. Oni povas demonstri la ŝanĝigon de arbareroj (evoluigo de natursimileco) per la komencigo aŭ finigo de certaj faradoj per ripetitaj taksadoj. Tiamaniere oni povas garantii daŭre uzeblecan naturprotektadon en arbaroj.

Aldonaĵo 3

La "Lexicon silvestre" kiel CD

Karl-Hermann Simon, Horst Weckwerth, Klaus-Peter Weidner – Eberswalde

Enkonduke denove estas substrekata la konduto de la aŭtoraro de la "Lexicon silvestre"(Ls), ke ĝi pledas pri la samrajtecon de ĉiuj lingvoj. Tio esprimiĝas ankaŭ en la CD, ekz. sekvas la vico de la lingvoj laŭ la DK-indekso por lingvoj.

Estas apartaĵo de la Ls, ke ĝi eliras de difinitaj nocioj kaj ne de terminoj.

Estas skizita la evoluo de la Ls. Ekzistas tri etapojn:

La unua ekde 1981 ĝis 1992 finiĝis per la eldono de provekzemplero por ĉ. 1000 nocioj en 24 lingvoj. Ĝis 1995 oni eldonis la Ls por kvar lingvoj en unuopaj apartaj volumoj, kiuj estas ligitaj unu kun la aliaj per samaj nocionumeroj.

Ĝis 2002 estis eldonataj printforme 12 lingvoversioj. Nun estas prezentata la skizo de CD, kiu enhavas ankaŭ 13 pluajn lingvojn. Por tiu ĉi lingvoversioj ĝis nun ne ekzistas la tradukoj de la enkondukanta parto kaj de la difinoj.

Al la uzantoj estas ofertataj en la CD kvar menulingvoj: Esperanto, Angla, Germana, Franca. La enhavo de la CD rilatas nur la ekzistantan materialon de "Prima pars" kaj "Secunda pars". Estas anoncataj pluaj partoj por estonta CD.

La principoj pri la strukturo de Ls kaj la nomoj de aŭtoroj estas indikataj sur la CD en la parto DOKUMENTOJ por la respektiva lingvo. La INSTRUKCION PRI LA UZO klarigas, ke post la klikado de la vorto LEXICON oni havas la sekvajn eblecojn:

Oni povas marki unu ELIROLINGVON kaj ĝis tri CELLINGVOjn, kiuj samtempe kun la elirolingvo aperas sur la ekrano.

Kiel serĉvorton oni enmetu tiun vorton, al kiu estu montrata sinonima vorto en la cellingvo. La serĉvorto enhavu nur literojn, kiujn oni povas generi per la respektiva klavaro. Sur la ekrano aperas krom la serĉvorto ankoraŭ ĉ. 20 vortoj, kiuj estas najbaraj en la alfabeto listo. El tiu ĉi listo oni povas eventuale elvoki deziritan serĉvorton, se oni ne povis generi ĝin pro mankoj de la klavaro.

Per klikado sur vorton aŭ numeron oni povas precizigi la sukceson de la serĉado, ekz. se oni trovis kelkfoje la saman vorton. Aperas la tuta teksto de la respektiva numero, t.e. ĉiuj terminoj kaj la difino. Plej eble baldaŭ oni intencas oferti "Demo-CD"n al interesuloj por aĉeto. Paginte kotizon por kodovorto, interesigantoj povas uzi la tutan CDn.

Aldonaĵo 4

Ideoj pri la estonta forst-terminologia laboro

Karl-Hermann Simon und Horst Weckwerth, Eberswalde

Dum la pasinta jaro povis esti publikigitaj 5 lingoversioj kaj donita unu plua licenco. 10 fakuloj de la Ebersvaldea faklernejo deklaris sin pretaj, kunlabori pri "Lexicon silvestre" (Ls).

Estis preparita CD enhavanta 25 lingvojn. El tiuj estas 13 lingoversioj sen tradukitaj difinoj. Oni ekkonis la laboramplekson por la tradukado kiel plej la gravan obstaklon. Estu provote, jam dum nia skizado de la difinoj malgrandigi la laboramplekson per pli simpla lingva formado. Preparante la difinojn por la "Sexta pars" oni jam nun atentu tion.

Kun vido trans la Ls-projekton ŝajnas necese, atribui atenton al la flegado de la forstfaka lingvo. Nian proponon pro formado de koncerna laborrondo transdonis prof. d-ro Wolff en la jaro 2000 al prezidanto de la ligo de germanaj forstfakaj esplorinstitutoj. Ni sekvas ties rekomendon kaj turnis nin al la gvidantoj de la unuopaj faksekcioj. Krome de prof. d-ro Anders ni ne ricevis reagon, kiu kondukas pluen. La Ls-projekto celas al pli bona internacia interkompreniĝo. Nia agmaniero povas ankaŭ helpi, ke la respektiva forstfaka lingvo estiĝos pli homogena, do ankaŭ helpos al pli bona interkompreniĝo ene de lingvokomunumo. Kadre de la Ls-projekto restas la ĉefa tasko, sekurigi la daŭrecon de la Ls-projekto. Tio ni realigu unue per tio, ke ĉiuj kunaŭtoroj konservu la senton, ke ilia kunagado estas bezonata. Due per tio, ke ĉiuj kunaŭtoroj ĉiam denove ekscias, ke la Ls-laboro havas elstarajn rezultojn.

Feliĉan Novjaron
Happy New Year
Bonne Nouvelle Année
Felice Nuovo Anno
Een Voorspoedig Nieuwjaar
Ein Gutes Neues Jahr
Godt Nytt Aar
Onnelista Uutta Voutta
Próspero Año Nuevo
С Новым Годом
Szczęśliwego Nowego Roku
Šťastny Novy Rok
Chúc mừng năm mới